# BEATRICE ALLÉE: PLANO POR SEMAJNFINA KURO

LA ASOCIO **ESPERANTO 44 (FR)** ORGANIZIS KURSARON DE SABATO, LA 7A GXIS DIMANCHO, LA 8A DE JUNIO, KAJ PROPONIS KURSOJN POR INFANOJ, TUTKOMENCANTOJ, KOMENCINTOJ, MEZNIVELULOJ KAJ TRADUKKURSON POR SPERTULOJ. ONI PETIS MIN GVIDI LA KONVERSACIAN KURSON POR MEZNIVELULOJ.

## 5 LECIONOJ PO 90 MINUTOJ – INTER 9 KAJ 12 KURSANOJ

**1. PREZENTADO LAŬ TABELVORTOJ** po 5 min = 1 h

Kiu, kio, kia vi estas?
Kie vi loĝas?
Kiom jara vi estas?
Kiam, kiel, kial vi esperantiĝis?
Kies lingvojn vi parolas?

**Por diskuti** – laŭ BekTri

| | |
|---|---|
| **Jes, eble, ne!** - kiel esprimiĝi | (Sylvain Lelarge) 10 min |
| **Interŝanĝo de ideoj** | 20 min |

| | | |
|---|---|---|
| **2.** | Serĉu viajn familianojn | (Doron Modam) 15 min |
| | Hastu malrapide! - | (Sylvain Lelarge) 10 min |
| | **Babiladet -** 45 min | |
| **3.** | Ĵus vekiĝinte, ŝi ... | (Sylvain Lelarge) - 45 min |
| | Rakontu pri aĵo via – | Sylvain Lelarge) - po 3 min (45 m) |
| **4.** | Resto-racie | (Judit Felszeghy) 45 min |
| | Elturniĝu! | (Sylvain Lelarge) 45 min |
| **5.** | Kie diablo ne povas... | (Monika Molnar) 60 min |

REZERVO:

Amo en Piranho – Trovu tekston al bildrakonto (2- aŭ 3-membraj grupoj)
Alvenas la gastoj – eble en grupoj
Filmo: Mazi / Pasporto al la tuta mondo / ...
Sondosiero: Monda Mozaiko
Triviala Sekvado (Metiejo – Ludoj)
Skrablo (Metiejo- Ludoj)

# BEATRICE ALLÉE: SPERTOJ PRI SEMAJNFINA KURSO

**LA ASOCIO ESPERANTO 44** ORGANIZIS KURSARON DE SABATO, LA 7A ĜIS DIMANCHO, LA 8A DE JUNIO, KAJ PROPONIS KURSOJN POR INFANOJ, TUTKOMENCANTOJ, KOMENCINTOJ, MEZNIVELULOJ KAJ TRADUKKURSON POR SPERTULOJ. ONI PETIS MIN GVIDI LA KONVERSACIAN KURSON POR MEZNIVELULOJ.

La tasko interesegis min, ĉar ĝis nun mi ĉefe instruis al komencantoj. Sen ia ajn sperto do, mi decidis konsulti la lernilotekon de edukado.net kaj elprintis la liston de paroligaj lerniloj por mezniveluloj. El tiu listo mi elektis dekon da lerniloj, kiuj ŝajne bone trafis la celon kaj korespondis al mi. Multe helpis la detalaj indikoj pri uzo kaj ankaŭ pri necesa tempo: mi disponos de kvin instruperiodoj po 90 minutoj.

Aldone al du ekzercoj por ĉiu periodo, mi preparis liston kun kelkaj aliaj lerniloj, kaze ke la afero iros tro rapide. Sed fakte, la paroligo tiom bone funkciis, ke ni eĉ ne sukcesis plenumi la tutan planon, tiel ekzemple « babiladet' » restis en sia skatolo, kaj mankis tempo por aŭskulti Mondan Mozaikon aŭ spekti iun ajn filmon – mia komputilo vojaĝis senutile.

Kiam fine la naŭ (la sekvan tagon ili estos dek kursanoj kunvenis en la klasĉambro, mia unua anonco estis pri la ne-graveco de erarfarado, la celo estu, ke la kursanoj parolu – eĉ kun eraroj! Surtabule troviĝis la korelativdemandoj kaj ĉiu devis paroli pri si mem dum 5 minutoj - mia poŝtelefono anoncis la finon de la « torturo ». Evidentiĝis, ke la nivelo estis ege malsama, sed tio fakte montriĝis bona afero, ĉar la kursanoj korektis kaj helpis unu la alian.

La « lecionoj » okazis ne nur en la klasĉambro, ĉar por profiti la belege sunan veteron, ni piediris ĝis la marbordo kaj survoje aŭ surloke preparis la sekvan ekzercon. Reveninte sub la arboj ĉiu grupo klarigis kiel ili elturniĝis pri la tiklaj problemoj.

Laŭ la komentoj de la lernantoj mi, aŭ pli ĝuste - ili trafis la celon. Ili babilis por paroli pri si mem aŭ aĵo sia, por trovi siajn familianojn, por prepari skeĉon, por priskribi la agojn de la aliaj, por elturniĝi pri tiklaj problemoj, ktp. La etoso estis ĝoja kaj malstreĉiga. Post kiam ili finis paroli – kaj nur tiam, mi klarigis pri kelkaj eraroj aŭ eĉ demandis al ili mem aŭ la aliaj, kie troviĝas la eraro. Tiel ili ne malkuraĝiĝis kaj pli kaj pli babilis esperante, nur tre malofte krokodilante.

La paŭzoj kaj la fino de la lecionoj alvenis ĉiam tro frue, fakte kiam mi rigardis la horloĝon, ni jam malfruis!

POR PREPARI TIAN KURSON, SEN LA LERNILOJ DE EDUKADO.NET, NECESUS MULTHORA LABORO. MI DANKAS AL ĈIUJ, KIUJ DISPONIGIS SIAJN MATERIALOJN KAJ ĈEFE AL KATALIN K., KIU ENRETIGIS ILIN TIEL, KE TRE FACILAS TROVI, ELEKTI, TAKSI KAJ UZI TIEL DIVERSTEMAJN, DIVERSMETODAJN, SED ĈIAM UTILAJN KAJ EFIKAJN EKZERCOJN.